

la Riverego

ISSN 0830-9574

Bulteno de Esperanto-Societo Kebekia

Januaro 1986. Numero 1-a. Jarkolekto 1-a.

FINFINE

1-A

NUMERO

APRILA RENKONTIĜO

en IBERVILO

redaktore

Nu, ESK nun havas sian propran bultenon. La elekto de ĝia nomo fare de la estraro estis tute ne facila afero. Elektendis el inter tri nomoj. Fine venkis *La Riverego*.

Nomo de la nura Kebekia bulteno internacilingva devis iel speguli Kebekion. Kaj Kebekio kuŝas laŭlonge de grandega riverego, Sankta Laŭrenco. Kebekio unue disvolviĝis borde kaj pere de la riverego. Kaj ankoraŭ nun, plej multaj Kebekianoj loĝas proksime al ĝi. Pli malpli spino de nia lando restas ĝi.

Jen pri la nomo. Sed plej ĉefas la enhavo, ĉu ne? *La Riverego* estas unue la organo de ESK. Gravaj estos do la informoj pri la agado de ESK kaj la Kebekia movado.

Sed ne estos nur tio. *La Riverego* estas revuo, ne estrara komunikilo. Ĝi do traktos ankaŭ aliajn temojn, se eble. Ĉiam estas interese pritrakti la mondan movadon. Kaj ni ne forgesu literaturon. Jam en tiu ĉi unua numero estas teksto de kanto. Kebekia, sed tradukita en Esperanton. Nia kulturo disvolviĝas en mondon pere de Esperanto.

Kaj *La Riverego* ankaŭ povus esti diskut-forumo inter la ESKanoj. Mi aperigos ĉiujn reagajn leterojn. Kaj artikoloj mallongaj ĉiam bonvenas. Eĉ se mi estas la redaktoro, *La Riverego* ne estas mia revuo, sed tiu de ESK. De vi.

Saluton

La Riverego estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate. ISSN 0830-9574.

Redaktoro: Sylvain Auclair

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Senpage por la membroj de ESK.

Por aliaj: jara abono: 5\$, aerpoŝte: 6\$

UEA-kodo: kebk-d

Adreso: Société québécoise d'espéranto

C.P. 126, succ. Beaubien

Montréal, Québec

KANADO

H2G 3C8

prezidante

Montrealo, januaro 1986

Kun granda plezuro kaj eĉ iom da emocio, mi skribas ĉi tiujn liniojn. Jes, E.S.K. paŝas antaŭen. Jen plia servo al la membroj, tiel estas oferti al vi societan bultenon.

La Kebekianoj estas pli kaj pli malfermitaj al la ideo de internacia lingvo. Kiam eblas, varbu ilin fariĝi "Amikoj" de nia Societo. Tia subteno estas tre grava.

Kiel Esperantisto, vi certe jam travivis spertojn pri la taŭgeco, la utileco kaj la internacieco de Esperanto. Estas nun la tempo plifortigi la rilatojn kaj la kontaktojn inter la Kebekia Esperantista komunumo, tio estas vi kaj mi.

Mi profitas la okazon por bondeziri al vi, ĉion bonan dum la jaro 1986.

Sincere,



REMEMBRIĜO

Multaj ESKanoj ne remembris.

Ceux et celles qui n'ont pas encore payé leur cotisation trouveront un formulaire d'adhésion avec cette revue. Il suffit de la remplir. Si vous ne le faites pas, ce *Riverogo* sera le dernier, donc le seul, que vous recevrez.

Vous pouvez payer directement à ESK, ou par l'entremise de votre club local. Les tarifs sont alors:

ordinara membro	5,00 \$
junula membro	2,50 \$
geedza membro	3,50 \$

Per via kotizo, vi abonos la nuran provincan esperantlingvan gazetan, vi helpas al la movado Kebekia, t.e. la disvastigo de Esperanto en Kebekio.

Eblas ankaŭ simple aboni aŭ abonigi *La Riverogon*. La prezojn vi trovos en la malsupro de la dua paĝo.

Nouvelles

Temas pri alia informbulteno de ESK, kiu ekaperis samtempe kiel *La Riverogo*. *Nouvelles sur l'Espéranto* estas franclingva bulteneto, kies legantaro estas la Amikoj de Esperanto, t.e. la neesperantistoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto. La redaktoro de *Nouvelles sur l'Espéranto* estas Patrice Mongeau, vicprezidanto de ESK. Li pritraktas la ĝeneralan movadon, la Kebekiajn okazaĵojn, la venontajn kursojn.

L'abonnement à *Nouvelles sur l'Espéranto* est de deux dollars pour un an, c'est-à-dire trois parutions. Les Amis de l'Espéranto sont ainsi informés des avantages que procurent l'Espéranto et des cours offerts.

Abonigu interesitajn amikojn.

Membrokarto

Bedaŭrinde, la membrokarto de ESK ne estas preta. Multaj membroj jam petis ĝin dum kunveno.

Ĝi verŝajne estos preta ĝustatempe, por ke ni sendu ĝin al vi kun la venonta *Riverego*.

Ankaŭ malfruaj estas la butonoj. Tiuj tutcerte estos pretaj por vendi dum la printempa Ibervila renkontiĝo.

Jubileo

Rapide alproksimiĝas la Centajara Jubileo de Esperanto. La Unua Libro eldoniĝis en 1887.

Tra la tuta mondo, esperantistoj kaj Esperanto-organizoj solenos kaj okazigos aranĝojn. Esperanto-Societo Kebekia kaj la Kebekiaj esperantistoj certe ne apartiĝos tiurilate.

Por digne festi la Jubileon, ni bezonas du aferojn: ideojn kaj monon.

Por la mono, ESK starigis Jubilean Fondaĵon. Ni akceptas kore ĉiujn mondonacojn. Simple skribu, ke estas por Jubilea Fondaĵo. Cetere, en la aliĝilo, estas aparta linio por tiu fako.

Pri la ideoj: kion fari okaze de la Jubileo. Jen tio por diskuti. Ni kompreneble akceptas ĉiajn ideojn rilate tion (sed ni ja preferas bonajn...). Simple skribu al ni. Ni ankaŭ povos diskuti pri tio en Ibervilo.

klube

En *Université de Montréal*, jam estis kelkaj esperantistoj. Nun ili formas etan klubon.

Ĝia ĉefa agado estas enkonduko de Esperanto-kursoj, kadre de la *Service d'Animation culturelle*. Tiu servo havas celon okazigi diversajn aktivecojn por la studentoj, i.a. kursojn.

Le *Rassemblement pour l'Espéranto à l'Université de Montréal* estis ideo de Louis Charbonneau. Jam okazis kurso en aŭtuna semestro. Tuj komenciĝos nova por vintra semestro.

Renkontiĝo

Okazos la tradicia printempa renkontiĝo en Ibervilo, apud Saint-Jean-sur-Richelieu, la 5an kaj la 6an de aprilo 1986. Tio estas semajnfino.

Vi ĉiuj estas kore invititaj.

Jen la programo:

Sabate	posttagmeze:	renkontiĝo
		vizito de la regiono
	vespere:	komuna vespermanĝo en
		restoracio
		amuza vespero
Dimanĉe	matene:	libera
	tagmanĝe	en acersiropejo

La prezo de la renkontiĝo estas 15\$. Tio inkluzivas la acersiropejan manĝon, kaj partoprenon en la aliaj programeroj. La amuza vespero okazos en kelo de preĝejo. Se vi havas ideojn pri tiu vespero, tuj kontaktu nin.

Noto: la komuna vespermanĝo en restoracio ne estas inkluzivita en la prezo.

Estos pliaj informoj pri la lokoj, kaj pri tranokteblecoj en la venonta *Riverego*, kiu aperos antaŭ la renkontiĝo.

Se vi volas partopreni, bv. plenigi la jenan kuponon, kaj ĝin sendi, pro ke ni ricevu ĝin antaŭ la 25a de marto.

Mi volas partopreni en la 4a printempa renkontiĝo de ESK, la 5an kaj 6an de aprilo, en Ibervilo.

Nomo: _____ Antaŭnomo: _____

Adreso: _____

Jen pago de 15,00 \$ al Esperanto-Societo Kebekia
C.P. 126, succ. Beaubien, Montréal, H2G 3C8

Notoj: _____

EKKIAM REGOS AM' SUR TER'

QUAND LES HOMMES VIVRONT D'AMOUR

Ekkiam regos am' sur ter'
 Alvenos tagoj sen malsato
 Ne plu premegos la mizer'
 Sed ni, jam estos mortaj, frato!

Kaj kiam regos am' sur ter'
 Trubadoriĝos la soldato
 For la milit', for la karcer'
 Sed ni, jam estos mortaj, frato.

En la longega vivoĉen'
 En kiu pelas nin la sort'
 Al ĉiuj viv', al ĉiuj mort'
 Nin trafis nur sufero kaj ĉagren'
 Ekkiam...

Sed kiam regos am' sur ter'
 Ĉu restos iom da kompato
 En tiuj tagoj sen mizer'
 Por ni, de longe mortaj, frato.

Ni kiuj en temp' de sufer'
 Kaj de milit' kaj de malŝato
 Serĉadis pacon sur la ter'
 Sed kiun ili ĝuos, frato.

En la grandega vivolud'
 Finiĝos bele la parti'
 Sed la perdantoj estu ni
 Jen tie ĉi plej saĝa la konklud'

Ekkiam...

De Raymond Lévesque
 Tradukis Georges Lagrange

Vi certe konas la melodion...

ESPERANTO-LIBRO-SERVO - LIBRAIRIE ESPERANTO

6358 de Bordeaux, MONTRÉAL, QC. H2G 2R8 • (514) 495-8442



La libro-servo de K.E.A. estas la plej granda esperantlingva libro-servo en Kanado. Fakte, ni vendas ne nur librojn! Ni havas ankaŭ kasedojn kaj diskojn por lerni aŭ distriĝi; ludojn kaj poŝtkartojn por amuziĝi aŭ korespondi; U.K. 84 sakojn kaj verdajn stelojn por butikumi aŭ esperantumi...

Ni rapide plenumas la mendojn kaj eĉ ne postulas antaŭan pagon. Niaj sendokostoj estas minimumaj. Se vi preferas vi povas viziti nin. Tamen, prudentas antaŭe telefoni por certigi ke iu estas.

Baldaŭ ni eldonos ampleksan libro-liston senpage havebla. Ni daŭre ofertas 10% rabaton por la mendoj kiuj superas 50\$.

Viaj amikoj aŭ konatuloj povas senzorge skribi al ni...franclingve. Se vi intencas instrui esperanton, kontaktu nin antaŭe kaj ni povos helpi vin trovi taŭgajn lernilojn.

Por mallongigi la vintron, ni ofertas al vi en februaro:

-Gerda malaperis. Claude Piron, 48 p.
Lingvo-instrua romaneto. Regule: 4\$ nun
kun rabato de 20%. Nur 3.20\$

-Faktoj kaj fantazioj. Marjorie Boulton,
432 p. Legolibro speciale por tiuj kiuj
apartenas al la kategorio progresantoj.
Bona lernilo devas esti interesa. Tiu libro
en 52 variaj ĉapitroj prezentas fabelojn,
mirindaĵojn kaj rakontoj el la tuta mondo.
Regula prezo: 20\$ kun 20% rabato, nur 16\$

MENDU TUJ - MENDU TUJ - MENDU TUJ - MENDU